Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg, Telefono R-27-803

Manuskriptoj nur resendotaj kontraŭ reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono komencebla ĉiumonate por Aŭstria ŝ 4.60, pagebla ankaŭ en part-pagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj) Ponumere 45 g (1 prk).

Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 4 (141) Korneuburg ĉe Wien, la 5. aprilo 1937. 14. jaro

Esperantista Somer-restadejo en Aŭstrio.

Gmunden, la bela urbo ĉe la plej granda lago de Supra Aŭstrio (Oberösterreich) estas elektita kiel **Esperantista Somerrestadejo en Aŭstrio** por la tutmonda esperantistaro.

La kurac-banloko Gmunden ĉe Lago de Traun situas sur unu el la plej belaj lokoj de la tuta nomata Salzkammergut, kiu kun siaj lagoj kaj neĝkovritaj montoj etendiĝas grandparte en Supra Aŭstrio kaj parte en najbara Salzburg-lando. Gmunden krome estas situanta unu el la plej belaj regionoj de Aŭstrio entute.

Kulismaniere kaj amfiteatre kuŝiĝas de tie la montoj suden, kie ili ŝajne falegas kun siaj grandegaj rokomuroj en la lagon. La ekkonilo de Gmunden estas Traunstein (monto), kvazaŭ impona fundo por la vilaĝego Traunkirchen, parte rekonstruita sur la insulon, ideala ideo por pentristoj kaj fotografistoj.

Enmeze de ĉi tiu unika pejzaĝo, enkonstruita grandparte en parkojn kaj ĝardenaĵojn, situas la kuracbanloko Gmunden. De la vasta Esplanado laŭlonge de la lago via rigardo migradas de la impona Traunstein al la malpli krutaj formoj de la malproksimaj montoj — rigardo de la grandiozo al la ĉarmo, ĉio komete rondigita kaj malgrandigita — plenumita somerspiro!

La specialaĵo de Gmunden estas la bordbanejo, situita en la plej trankvila kaj plej ĉarma golfo de la lago, la plej bela bordbanejo en Salzkammergut — la entuziasmigilo por ĉiu gasto!

Sed ankaŭ la uzado de diversaj terapioj estas ebla.

Gmunden ankaŭ havas kuracejon, teatron kaj filmteatrojn, kafejojn kun koncertoj ktp. Societaj aranĝoj kiel velkboatkuradoj, tenis-turniroj, festoj surlagaj ktp. donas riĉan amuzprogramon.

De Gmunden dumsomere okazas aŭtobus-rondveturadoj en ĉiujn direktojn, speciale al la aliaj lagoj en Salzkammergut kaj al Salzburg-urbo, la fama urbo de Mozart kaj de la Festludoj, kiuj okazas ĉiujare kun altkvalita programo kaj en kunagado de la plej famaj kantistoj kaj aktoroj kaj sub la direktado de Toscanini, Walter, Weingartner ktp.



Gmunden: Bordbanejo.

La plej ŝatata ekskurso estas per vaporŝipeto sur Lago de Traun al bela urbeto Ebensee kaj de tie per la plej fama el la 12 aŭstriaj kablofervojoj surmontaj sur Feuerkogel (monton) prks. 1600 m altan.

De tie prezentiĝas ne nur rava rigardo al 4 lagoj sed samtempe ankaŭ rondpanoramo, kiu ampleksas la tutan landon Supra Aŭstrio kaj ankaŭ la Salzkammergut-montojn kaj eĉ la limregionojn de Bavarujo kaj Bohemujo kaj la pintojn de la dorso de Tauern-montaro.

Vi pagos en Gmunden dum la tuta printempo, somero aŭ aŭtuno en Hotelo Schiff por unu tago aŭstriajn ŝilingojn 8.20 kaj ricevos belan ĉambron, tri kompletajn manĝojn kaj ne bezonos pagi la kotizon por banlok-gastoj, ĉar tiuj elspezoj jam estas enkalkulitaj kiel ankaŭ la trinkmono. Vere malalta prezo, kiun ni nur povis ricevi speciale por ni, ĉar alie la prezoj estas pli altaj. Krome vi havos kun nia atesto 50% rabaton sur la vaporŝipoj kaj sur la kablofervojo.

Belaj ekskursoj al ĉefurbo Linz de Supra Aŭstrio, urbo Wels, banloko Ischl, salminejo Hallstadt, al la famaj gigantaj glacikavernoj en Dachstein, Bad Aussee, al la diversaj lagoj (ne forgesu „St. Wolfgang“ kun ĝia Blanka Ĉevaleto) kaj al la unika urbo Salzburg kun ĝiaj Mozart-memorajoj kaj Festludoj (nomata „Norda Romo“). Ebleco por praktiki ĉiuspecan sporton: naĝi, bani, vel-kaj remboati, tenisludi, migradi, grimpi sur la montojn ktp.

Jen la ferio-hejmo de la esperantistoj el tutmondo!

Venu, ĝuu belegan pejzaĝon en bela Aŭstrio! Turnu vin al Esperanto-Varbad-Servo por Aŭstrio, Wien, I., Neue Burg, kontraŭ respondkupono aŭ respondkarto kaj anoncu vin senpere al Hotel „Zum goldenen Schiff“, Gmunden am Traunsee, Oberösterreich. Informu nin per simpla karto, kiam vi alvenos en Gmunden. Esperantisto je via dispono!

E.-Varbadservo AEA.

Esperanto en la moderna vivo.

Internacia Konferenco.

Paris, 14. ĝis 17. majo 1937

Protektoro: Ŝtatprezidanto Albert Lebrun.

Honora Komitato:

Ĉefministro Léon Blum,
Edouard Herriot, Prezidanto de Ĉambro de Deputitoj,
Jean Zay, Ministro de Nacia Edukado,
Max Dormoy, Ministro de Interno,
Spinasse, Ministro de Nacia Komerco,
Jardillier, Ministro de Poŝto, Telegrafo kaj Telefono,
Lebas, Ministro de Laboro,
Albert Rivière, Ministro de Pensioj,
F-ino Lacorre, Vicministrino por la Protekto de Junularo,
Jean Perrin, Vicministro de Scienca Esplorado,
Pierre Viénot, Vicministro de Eksteraj Aferoj,
Julien, Vicministro de Teknika Instruado,
Raoul Aubaud, Vicministro de Interno,
Pierre Dezarnaulds, Vicministro de Fizika Edukado,
Léo Lagrange, Vicministro por Sporto kaj Distro,
Lyautey, Vicministro de Agrikulturo.

3. komisiono: Sciencoj puraj kaj aplikataj.

La kampo de ĉi tiu komisiono estas tiom vasta kaj ampleksa. La Komisiono devis krom la rilatoj kun reprezentantoj de la puraj sciencoj konsideri la vastegan kampon de aplikado de tiuj sciencoj en la diversajn direktojn de la homa scio: tekniko.

Jam aliĝis al la konferenco diversaj fakuloj kaj estiĝis la problemo, ĉu sufiĉaj seĝoj estos je dispono. Dank' al la klopodoj de la Prezidanto de la Konferenco s-ro André Baudet la Generala Komisaro de la Ekspozicio s-ro Edmond Labbé disponis la vastan, modernan, komfortan konstruaĵon „La Centre Marcelin-Berthelot", tutproksime al Internacia Ekspozicio ĉe la granda palaco kaj placo „Invalides".

A. Matematiko.
B. Astronomio; navigacio.
C. Elektro. Fiziko.
D. Kemio: kemiaj industrioj; tinkturaj industrioj; paperoj, kartonoj, teksaĵoj.
E. Geologio; geofiziko; meteorologio; klimatologio.
F. Biologiaj sciencoj; evoluo; bakteriologio.
G. Botaniko; plantoj.
H. Zoologio; animaloj.
I. Medicino; farmacio; higieno; terapio.
J. Inĝeniera arto; mekanika teknologio; maŝinoj; metalkonstruado; metalurgiaj industrioj.
K. Telegrafo; telefono; radiotekniko.
L. Agrikulturo; abelkulturo.
M. Hejma mastrumado; meblaro ktp.
N. Ceramikaj industrioj.
O. Ledoj, feloj, peltoj.
P. Diversaj metioj.
Q. Konstruindustrioj, arkitekturo, urbanismo.

La komisiono faras alvokon al la kompetenteco de ĉiu (ĉu li jam enskribiĝis aŭ ne al la Konferenco), por ke oni atente ekzamenu la planon pri apartigo de la kongresanoj en la menciitaj fakoj, kaj ke oni prezentu ĉiajn rimarkojn aŭ kritikojn pri la proponita klasigo.

Organiza Komitato preparis kaj baldaŭ sendos grandan nombron da invitiloj al Institutoj, sciencaj asocioj, societoj komercaj aŭ industriaj, al trafikkompanioj ktp.

Tiuj institucioj kaj firmoj pli malpli multaj akceptos tiun inviton kaj sendos delegitojn aŭ reprezentantojn, por konstati la amplekson de nia movado kaj partopreni en la programo de nia Konferenco, en la fakoj, kiuj pleje interesos ilin. Estas memkompreneble, ke la esperantistaj kongresanoj plezure sin metos je dispono de la neesperantistoj, por faciligi ilian intervenon per traduko de iliaj pensoj, de iliaj praktikaj konsiloj, de iliaj rimarkoj, de iliaj kritikoj.

Jen la stato de la laboro de la 3. komisiono: Ĝi preparis kaj sendis al kompetentuloj laŭ la diversaj fakoj DEMANDARON pri la tri ĉefaj punktoj, indikataj sur la ĝenerala programo de la Konferenco:

A) Detalaj sciigoj pri la nuna stato de utiligado de Esp. (bibliografio, vortaroj, gazetoj, jarlibroj, faksocietoj ktp.) en la koncerna medio kaj en la tuta mondo.

B) Servoj kaj avantaĝoj, kiuj povos rezulti el pli granda disvastiĝo de E.

C) Plej taŭgaj proponitaj rimedoj por faciligi kaj rapidigi la disvastigon de E.

Post reveno de la Demandaroj la Komitato havos la materialon por verki la raportojn, prezentotajn dum la Konferenco.

DEMANDARO rilata al Supera Instruado.

Se E. estus enigita kiel laŭvola lingvo en la programon de la abiturienteco, ĉu oni trovus facile ekzamenontojn en la diversaj universitataj centroj?

Ĉu la grupoj esp-istaj de la universitataj urboj povus starigi liston de personoj, kiuj povus fariĝi ekzamenontoj en siaj urboj?

Ĉu konvenas malfermi laŭvolajn kursojn de E. en la priliteraturaj fakultatoj?

Ĉu tiuj kursoj estus necese kursoj superaj?

Ĉu oni ne povas komenci per elementaj kursoj?

Ĉu vi opinias, ke specialaj sankcioj estus necesaj por tiu instruado? aŭ ke la ekzamenoj pasigitaj de la E.-societoj povus ilin anstataŭi?

Ĉu estus oportune starigi en la priliteraturaj fakultatoj oficialajn kursojn?

Ĉu vi opinias eble instrui E-on en la Fakultatoj pri sciencoj, juro aŭ medicino? Sub kia formo?

Kion vi pensas rilate al uzo de E. pri jenaj temoj:

— Interŝanĝo de studentoj inter diversaj landoj.

FESTSEMAJNOJ EN WIEN

Ekspozicioj pri teatro,
muziko, dancado, sporto.

— Komunaj serĉadoj sur diversaj sciencaj kampoj.

— Fondo de malgravaj grupoj inter studentoj.

— Kunlaboro per E. por ekzamenoj inter personoj diverslandaj, ktp.

La oficiala konferenca marko.

Desegnita de nia s-ano Thézard ĝi jus aperis. Kiu ne povas partopreni la konferencon, almenaŭ propogandu por ĝi pere de la Konferencmarko. 100 kostas 7 fr. fr. aŭ 5 resp. kuponojn.

Jubilea Kongreso de Esperanto.

Warszawa, 7.—15.aŭgusto 1937

Protektoro: Ŝtatprezidanto prof.d-ro Ignacy Mościcki.

Honora Komitato:

Ĉiuj Ministroj
Prezidanto de l' ĉefurbo Warszawa
Aliaj Altranguloj.

Adreso: Warszawa I, str. Chmielna 26, m. 8.

Favorkotizoj por frupagantoj:

Ĝis 30. de aprilo (rabato 20%): I. kotizo angl. ŝ. 28/—, II. familiano 17/6, III. helpkongresano 11/—.

Ĝis 30. de junio (rabato 10%): I. angl. ŝ. 31/6, II. 20/—, III. 12/6.

Pagmaniero: Al aŭstria poŝtŝparkasokonto Wien 115.973, aŭ Warszawa P. K. O. 23.445.

Vizoj: Senpaga vizo ĉe ĉiu pola konsulejo. En ČSR senpaga travojaĝ-vizo ĉe la ČSR-konsuloj. Pri aliaj tiaj senpagaj vizoj LKK klopodas.

Kontraŭ speciala legitimilo de LKK sur polaj fervojoj 33% por ambaŭ direktoj, kaj al 6-foja veturado tra Polujo.

Karavanoj el diversaj landoj. El Aŭstrio: Internacia E.-Muzeo en Wien, I., Neue Burg.

Sekcioj:

A) Propaganda kaj gazetara: gvid. red. Adam Uziemblo.

B) Turista kaj loĝeja: gvid. dir. en Trafikministerio s-ro Bronislaw Wyszyński. La aferojn preparas Turisma Societo de esperantistoj en Polujo. — Trafikministerio aperigos baldaŭ 12 E.-broŝurojn pri diversaj polaj urboj kaj regionoj. — Komuna pilgrimo al la naskiĝurbo de la majstro, Bialystok, kaj 5 postkongresaj ekskursoj, kiuj finiĝas en pitoreska somerrestadejo.

Loĝejoj: Hoteloj: luksaj (kategorio I) zloty 8—24 potage, kat. II 6—8 zl; privataj ĉambroj 3—5 zl; komunaj turistaj loĝejoj 2—3 zl. Trinkmono enkalkulita.

Manĝado: En Polujo mal multekosta. Matenmanĝo: kafo aŭ teo, ovoj, buterpano 1 zl. Tagmanĝo aŭ vespermanĝo 1—2 zl. Oni povas bone manĝi por 3—4 zl potage. Propaganda materialo pri Varsovio kaj Polujo nun estas preparata por prelegoj kun lumbildoj. Kiu emas fari tiajn prelegojn, skribu al LKK.

Ĉiuj prezoj en hoteloj kaj restoracioj sen iaj **alpagoj**, trinkmono ĉiam enkalkulata.

C) Literatura: gvid. Juljan Tuwim. Projektoj: aranĝi literaturan konkurson, eldonon de „Ora Libro de Esperanto", Pola Antologio ktp.

D) Grafika kaj dekoracia: gvid. Waclaw Falkowski, artisto-grafiko, kaj Jakób Wizenberg, inĝeniero-arkitekto. Glumarko baldaŭ aperos.

E) Teatra: gvid. Feliks Falkowski, dramartisto.

La distra parto jam preparata. Dum koncerto pianludos s-ano **Imre Ungar** el Budapest, konata Chopin-interpretisto; dum Interkonata Vespero literatura E.-kabaredo. Kunlaboras Jean Forge.

F) Kursa: gvid. Borys Strelczyk. Amasaj kursoj komenciĝis sub gvidado de Tiberio Morariu.

G) Fakaj kongresoj kaj kunsidoj: gvid. Eugenjusz Rytenberg kaj Jan Zawada.

UABA (biindaj esp-istoj), adreso: Jan Silhan, Lwòw, str. prof. Ptaśnika 45.

TAGE. Adreso: d-ro Bj. Beckman, Konstapelsgatan 19, Karlskrona, Svedujo.

TEKA. Adreso: sekr. d-ro Miecyslaw Zamenhof, Warszawa, str. Senatorska 36.

H) KOOPERATIVO. Estas projektata fondo de Int. Oficejo por kooperativaj problemoj.

J) Sporta: gvid. Tadeusz Mayzner.

K) Jubileaj **aranĝoj kaj ekspozicio.** Solenajoj ĉe la tomboj de Majstro kaj Grabowski, Festo de Veteranoj kaj Jubilea Ekspozicio estos aranĝitaj. Landaj organizoj, grupoj kaj izolaj s-anoj pruntu kontraŭ kvitanco materialon. La liston sendu en 3 kopioj.

Honora Stelo.

Estas projektita Jubilea Stelo en du gradoj: I. veterana ora por ges-anoj, kiuj aliĝis al la movado dum la unua jardeko de ekzistado de E.: 1887—1896, 2. pionira arĝenta por ges-anoj el la periodo 1897—1912. Regularo kaj detaloj sekvos.

Garantia Fondo.

La Jubilea havos multajn elspezojn. Ĉiu estas petata partopreni en Garantia Fondo, estanta sub kontrolo de Pollanda E.-Delegitaro en Kraków. Ĉiu paginto ricevos obligacion, repagotan laŭ bilanco, fermota la 1. 1. 1938.

Fervoja **rabato** sur Ĉeĥoslovakaj Fervojoj 75-procenta. R. Bloch, Praha-Smichov 106, ČSR.

AL TEKA-anoj.

Ni nin turnas al ĉiuj kunfratoj (kuracistoj, farmaciistoj, dentkuracistoj ktp.) helpi al nia bonega sukceso de niaj kunsidoj dum 29-a en Varsovio:

1. Se nur eble venu kaj anoncu vin al TEKA-kunvenoj.

2. Preparu prelegon por niaj kunvenoj kaj informu nin pri tio.

3. Konsilu al ni, ĉu aranĝi la TEKA-kunsidojn antaŭ aŭ dum la ĝenerala kongreso?

4. Ĉu oni elektu unu sciencan temon, kiun triparolos 3 referentoj el diversaj landoj, ekz. pri „Novaĵoj en la kankra demando". Pri la sama temo referus laŭ siaj vidpunktoj 3 kolegoj-fakuloj: internisto, rentgenologo kaj ĥirurgo.

5. Ĉu lasi al kolegoj liberecon en la elekto de temoj.

6. Ĉu ne prepari deziresprimon de la kongreso, prezentotan al registaroj pri enkonduko de nia lingvo en Internaciajn Medicinajn Kongresojn kaj en medicinajn ĵuralojn?

D-ro W. Róbin, prez. de TEKA

Paroĥa preĝejo kun paroĥejo en Seewiesen proksime al Mariazell.

Originala artikolo por AE de inĝ E. H. Jordan, Bundeskommissariat für Heimatdienst" en Federacia Kancelierejo.

En tiu malgranda Malsuproaŭstria vilaĝo kun ĝia ĉarma pejzaĝa ĉirkaŭaĵo montras bildon, preĝenata entute de modernaj influoj, kaj estas pro tio prefere vizitata de fremduloj.

Reichsbrücke en Wien

interligas la distriktojn Leopoldstadt kaj Floridsdorf kaj havas 12 m larĝan veturvojon de Federacia Ŝoseo, 2 relparojn de tramo kaj 2vojojn por piedirantoj. Laŭ sia longeco de 1230 m ĝi estas la tria ĉenponto en Eŭropo kaj estis konstruita kun kostoj de pli ol 25 milionoj da ŝilingoj. Ĝi estos finkonstruita en aŭtuno.

Aŭstrio, la preferata lando de la regentoj.

Kiel konate la **Duko de Windsor** vivas de kelkaj monatoj en Aŭstrio sur Kastelo Enzesfeld. Kelkfoje dum la semajno la Duko vizitas Wien kaj rigardas la vidindaĵojn kaj kolektojn de nia antikva kaj moderna urbo. Lia reĝa moŝto la Duko de Windsor, jam konata inter la loĝantaro de Wien, ĉiam estas salutata de multaj homoj, kiuj ĝojas, ke al la alta gasto tiel plaĉas nia kara lando. Lia Moŝto ankaŭ multe praktikis la „blankan sporton" sur Semmering.

Ni esperas, ke la Alta Gasto restos por ĉiam ĉe ni!

La **Reĝino de Nederlando** dum certa tempo restadis ĉe ni en Igls kaj ankaŭ ĝuis la „blankan sporton" ĉe ni. Poste Ŝia Majesto restis pli longan tempon en Mittersill kune kun siaj gefiloj, la Kronprinca Paro, kiu post restado en Wien veturis al Mittersill kaj tie nun jam restas dum multaj semajnoj.

Ni aŭstrianoj ĝojas, ke nia lando kaj ties loĝantaro tiom plaĉas al la Altaj Gastoj kaj ke la Gastoj sin sentas hejme ĉe ni.

Aŭstrio ĉiam pli fariĝas preferata lando de eksterlandanoj! Ni faros nian eblon, agrabligi kaj plibeligi al ili la restadon!

El la legantaro:

Tre estimata s-ro kortega kons.!

Mi danke kvitancas la ricevon de via letero pun la gazeto „Aŭstria Esperantisto", kiun mi rigardis kun granda intereso . . .

Kortega kons. **prof. R. Krasser,** afergvid. prez. de Urba Lernejkonsilantaro de Wien.

Mi gratulas plej kore al la bela evoluiĝo, kiun havis via ĵurnalo „Aŭstria Esperantisto" de jam pli longa tempo.

La ideo, disponigi vian ĵurnalon tiom multe al la servo por la bela Aŭstrio, estas tre bono kaj meritas rekonon.

La riĉa enhavo de via ĵurnalo, elegante substrekita per nobla kaj neta presaranĝo, alkonduku al vi multajn novajn amikojn por la bone de nia kulturtasko kaj por Aŭstrio . . .

A. Schwarz, Wieselburg.

„Mi estas treege ĝojigita, ke vi aperigis la bonegan artikolon de Scherer en via gazeto . . ."

Paul Komposch, Klagenfurt.

„Mi deziras al vi feliĉon kaj riĉan benon por via Esperanto-agado . . ."

Bruno Fröhlich, Hannover.

„Ricevu ĉi tiun libron, mi petas, kiel esprimon de mia admiro por via valora, sindonema laboro por Esp. Kvankam mi estas tre malproksima de via urbo, mi tamen konstatas la meriton de via laboro pro la Zamenhofa lingvo, kiu ja promesas sanktan harmonion."

Wm. H. King, Honora sekr. de Novzelanda Esp.-Asocio, Wellington, Aŭstralio.

Inter la leteroj, kiujn ricevis nia Federacia Kanceliero el ekster- kaj enlando, ni publikigas jenan de s-ano Tilscher, D. Wagram:

„Permesu, ke ankaŭ mi
milfoje kore dankas al vi.
Viaj belaj vortoj akompanaj
en Aŭstria-Esperantisto estos ne vanaj.
Multaj gutoj faras maron
kaj multaj samideanoj — la grandan esperantistaron.
Mi petegas vin, laboru ankaŭ por ni movado.
Aŭstrio vivu, sub via gvidado!"

„Mi ŝatas legi vian gazeton" **Ferguson,** Ruatoria, Novzelando, Aŭstralio.

„Vidinte Aŭstrian Esperantiston mi rapidas gratuli vin pri ĝia indo. La vortoj de d-ro Kurt Schuschnigg estas tre belaj. Estas tre kuraĝige trovi altrangulojn, kiuj interesiĝas en niaj idealoj."

I. K. Walker, Melbourne, Aŭstralio.

Demando!

Ĉu vi aŭ konato de vi en eksterlando deziras ricevi nian gazeton regule? Tiam sendu 9 respondkuponojn por la tuta jaro 1937 aŭ kvanton da bonaj uzitaj poŝtmarkoj el via lando, prefere aer-, bonfarem-, jubileo-poŝtmarkoj. Afranku filatelie. Laŭ la valoro ni sendos eventuale por tuta 1937 la gazeton.

Mi deziras **interŝanĝi** pm. kun USSR, Italujo, Hispanujo, Portugalujo kaj Ekstereŭropo. Kont. kons. Steiner, Wien, I., Neue Burg, eldon. de la gazetto.

Printempofesto en Wachaŭ 1937.

Por AE verkita de iama Ministro por Instruado kaj nuna prezidanto de Eknomiga Komisiono por Instruistoj en Niederösterreich, **d-ro Emmerich Czermak.**

La ministro mem estis preta, fari ĉi tiun radio-paroladon, sed estis malhelpita je sia granda bedaŭro. Tial la prelegon faris inĝ. Hugo Steiner.

Inter arbarkovritaj montoj brilas la arĝenta rubando de larĝa riverego. Afable frukto-kaj vinkulturejoj vastiĝas sur levigantaj terasoj je ambaŭ flankoj de la bordo, kasteloj salutas, vilaĝoj kaj urboj invitas gastame al restado. Super ĉio ŝvebas la gaja trankvilo de ĉarma kaj tamen fortoplena pejzaĝo. Tio estas Wachaŭ (elp. Vahaŭ), la mirinde bela Danubo-valo en Malsupra Aŭstrio inter la urboj Melk kaj Krems, de iliaj konantoj amata kiel elektita regiono, sed al la granda publiko preskaŭ ne ankoraŭ konata.

Se Danubo ankaŭ formas pra-an vojon, sur kiu jam Nibelungoj riskis sian vojaĝon al reĝo Etzel, Wachaŭ tamen restis ĝis en la lasta pasinteco malmulte frekventata regiono. Ankaŭ la fervojkonstruado en la jaro 1909 en tio ne multon povis aliigi. Nur per la plukonstruado de la ŝoseoj la fremdul-frekvento atingis videblan vigligon. En la pasinta jaro en la kadro de printempofesto en la unuaj tagoj de majo, malgraŭ parte malbona vetero, eksterordinare granda vizito estis konstatebla kaj estiĝis la deziro, ripeti la printempofeston en pligrandigita grado ĉiujare.

Pro tio ĝi estos aranĝata en la jaro 1937 dum la tuta majo grandstile. Longa vico da institucioj, asocioj kaj ligoj en ĝi kunagados. La preludon faros la solena inaŭguro de bildo-ekspozicio en Krems flanke de sinjoro Federacia Prezidanto mem. La saman tagon ankaŭ mezepoka foiro, kiu prezentas, laŭ la tendoj kaj kostumoj laŭstile longe pasintan epokon, estos inaŭgurata. Laŭ la historia grundo, kiun Wachau reprezentas, estos aranĝata grandstile historio-ludo je la festotagoj kaj dimanĉoj. Ĉiuj modernaj reĝiartaĵoj de aktoroj, laŭtparoliloj, amas-scenoj estos uzataj. Larĝan spacon okupos karavanoj en naciaj kostumoj, ĉar Wachau mem estas regiono, kie bela nacia kostumo estas hejma; speciale la or-kufoj de la virino, estas karakterizaj kaj ege ĉarmaj.

Multnombraj orkestroj kaj kant-unuiĝoj zorgos pri muzikaj prezentadoj unuarangaj. Vienaj Filharmoniistoj, Vienaj Kant-knaboj kiel internacie famaj institucioj estos inter tiuj.

Ankaŭ Sportaj aranĝoj kapablos, altiri multnombrajn sportamantojn. Krom kelkaj mitingoj okazos landludo Malsupra Aŭstrio kontraŭ Supra Aŭstrio en la kadro de la



Granda Sgraffito-Domo en Krems a. d. D., en kiu naskiĝis la Statprezidanto de Aŭstrio, s-ro Wilhelm Miklas, protektoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, estas arte valora kaj interesa. „Sgraffiti" sur la eksteraj murvandoj montras scenojn el Malnova kaj Nova Testamentoj, el romana historio kaj popularajn bildojn de freŝa origineco. La konstruaĵo originas el la mezo de la 16. jarcento.

festo. Danubo mem estos la rendevuejo por akvosporto, aranĝoj de kajak-ligo, veturado kun lampionoj kaj tiel plu.

Aŭstria Junpopolo aranĝos en la kadro de la festo grandan junul-mitingon.

Multnombraj profesi-korporacioj uzos la okazon, por okazigi en la kadro de Printempfesto en Wachaŭ profesiajn kunvenojn. Sed same ankaŭ aliaj unuiĝoj. De la 30. de aprilo ĝis la 2. de majo okazos en Krems Esperanto-Kongreso de Aŭstrio. Dum la monato majo okazos la grandaj paradoj de la Federacia armeo.

Memkompreneble estas antaŭzorgite grandmezure por la manĝado kaj loĝejo. Granda parto de la privataj domoj metis sin en la servon de la festo kaj ankaŭ gastigos fremdulojn. La Federaciaj Fervojoj konsentis por ĉiuj vizitontoj de la festo grandan rabaton, same Donau-Dampf-Schiffahrtsgesellschaft.

Ni aldonu, ke ankaŭ la naturo en Wachau surmetas sian festveston. Dum majo ĉiuj la multnombraj fruktoarboj en Wachau, speciale la multaj abrikot-arboj, estas en plena florado.

Ĉio estas preta, por aranĝi la Printempofeston en Wachau 1937 plej bele. Ne nur el tuta Aŭstrio, sed ankaŭ el la proksima kaj malproksima eksterlando multnombraj interesuloj sin jam anoncis, kiuj deziras pasigi la tempon antaŭ Vienaj Festsemajnoj en la ĉarma Wachau. Multspecaj fadenoj ja interligas nin kun malproksimaj landoj. Kiel konate reĝo Rikardo Leonkoro de Anglujo estis en la jaro 1194 kaptito de la babenbergano Leopoldo V. en la fortikaĵo Dürnstein. (Ni permesas al ni la rimarkon, ke dume la rilatoj inter Anglujo kaj Aŭstrio esence pliboniĝis.)

Tiel ni povas esperi, ke Wachau, kiu estas kaŝita peco da sorĉolando, fariĝos konata per Printempofesto en Wachau 1937 en vastaj rondoj. Konantoj diras, ke ĝi facile povas konkuri kun Rhein-riverego, eĉ pro ĝia trankvilo kaj soleco ne malmulte superas ĝin. Kaj ankaŭ ĉi tie parolas ruinoj, antikvaj monaĥejoj kaj grandiozaj abatejoj pri potenca historia pasinteco, kiel ankaŭ la aŭstria arkitektura arto estas riĉmezure ĉi tie reprezentata.

Estas vere aŭstria peco da grundo, kiu ĉi tie servu dum kvar semajnoj al la nobla ĝojo kaj al la plezuro, aŭstria peco da grundo, kiu nur en lando, pejzaĝe tiom riĉe benata, ĝis nun povis resti tiel ne sufiĉe konata.

Afergvidanto por Federacia Lando Malsupra Aŭstrio de „Nova Vivo", helpverko en Patriota Fronto Aŭstria, sinjoro Ministro iama d-ro Emmerich Czermak, kiu kun sinjoro kortega konsilisto d-ro Karl Wimmer de Federacia Registaro en Malsupra Aŭstrio kaj kun la komunum-estraroj en Wachau unuigas en sia mano ĉiujn aranĝojn, kiuj koncernas la Printempofeston en Wachau, intencas plibeligi kaj pligrandigi la Printempofeston en Wachau en ĉiujara ripetado kiel grandan reprezentan aranĝadon de Federacia Lando Malsupra Aŭstrio.

EL LA MONDO

„Ministero per la Stampa e la Propaganda", Cronache Italiane del Turismo, Via Vitt. Veneto 56, **Roma** nun preparas luksan broŝuron **„La kvar sezonoj".**

Mendu per simpla karto en E. tuj la bezonotan kvanton de la broŝuroj senpage.

Internacia Foiro de Budapest:

30. aprilo—10. majo, eldonis propagandilojn, malgrandajn afiŝojn kaj belajn glumarkojn en Esperanto. Oficejo: Budapest, V. Alkotmány utca 8. — Entrepreno de IEL.

Turisma Kunveno internacia de Fervojistoj

Pentekoste en Torino, Italujo.

Neniu kotizo. Kostoj de restado de 16. ĝis 18. majo, 3 maten-, 3 tag-, 2-vesper-manĝoj, 2 tranoktoj entute 85 it. Lirojn. Informojn ĉe „Dopolavoro Ferroviario", Via Sacchi 25 bis, Torino.

European Herald, London, 54 Fleet Str., publikigas siajn artikolojn samtempe en angla, franca, germana, hispana, itala kaj Esperanto-lingvoj. Grava afero, subtenota per mendo de la gazeto.

Anglujo. 27-a Jubilea Brita E.-Kongreso, 23. ĝis 26. aprilo en High Leigh, Hoddesdon, Hertfordshire.

Belgujo. 8. Flandra Kongreso, Leuven, Pentekoste.

Finnlando. En Presejo de Uudenkaupungin Sanomat jus aperis, tradukita de Hugo Salokannel, la E.-Himno en finna lingvo.

La Aŭstria Skoltoligo.

Radioparolado de Hugo Jakob la 9. aprilo 1937.

La fondinto de la skolta movado sur la teritorio de la nuna Aŭstrio estas ekskapitano Emerich Teuber. Observante la variajn formojn de la junularmovadoj en diversaj landoj, li ĉiam trovis en gazetoj raportojn pri grandaj sukcesoj de „Scoutism", junulmovado, kreita de la angla kolonelo Baden-Powell. Ĉi tiu sistemo treege kapablis veki la intereson de la knaboj kaj direkti iliajn ambicion kaj romantikecon sur ĝustan vojon.

Teuber decidis fondi skoltan movadon en Aŭstrio. El pormilitara junuledukejo „Erdberger Jugendwehr" li elektis 6 knabojn kaj formis la unuan roton. Ejo baldaŭ estis trovita. La knaboj entuziasme sekvis la instruon kaj en oktobro 1912 Viena gazeto raportis pri la starigo de skolt-korpuso. Interesuloj anoncu sin! Unu el tiaj interesuloj 18-jara mezlernejano kun preskaŭ sia tuta klaso aliĝis kaŝe, ĉar la lernejaj aŭtoritatoj tiam ankoraŭ ne rekonis oficiale la novan movadon. En novembro la unua roto estis uniformita kaj la 30-a novembro prezentis la unuan publikan prezentadon antaŭ aŭtoritatuloj. Ĉefoj de oficialaj instancoj, profesoroj, instruistoj kaj junulgvidistoj, admiris la skoltajn artojn de la knaboj. Observaj ludoj, memor-ekzercoj alternis kun „unua helpo ĉe akcidentoj" kaj signalado per flagoj. Fine la junuloj rostis sur alkohol-kuiriloj farunaĵon „Palatschinken" kaj prezentis ilin al gustumado. La sukceso estis granda. La gazetoj raportis per longaj artikoloj.

Kelkajn tagojn poste okazis impresa ceremonio: konsekrado de la flago kaj la solena „skolt-promeso" de la unuaj du rotoj en malgranda preĝejeto de Gersthof.

En januaro 1913 jam ekzistis la trupo 2 „Lothringen" kaj 3 „Oesterreich", kiuj kun la trupo 1 „Habsburg" kaj la kaŝa mezlerneja trupo formis la Viena-n korpuson. Dum la somero varbado kaj propagandprezentado sur la erikejo de Perchtoldsdorf zorgis por aliĝado. Nove fondiĝis la trupoj „Radetzky", „Laudon" kaj „Prinz Eugen"; ĉe la periferio de Wien la katolika trupo „St. Georg" instalis en la 10. distrikto sian ejon. Samjare la unua knabin-trupo fondiĝis. Du novaj ejoj estis akiritaj. Ekskursoj en la naturon, teren-ludoj unuflanke, zelkonscia laboro kaj ekzercado de skoltaj specialaĵoj en la ejoj aliflanke zorgis por la necesa perfektiĝo; krome estis lingvaj kursoj, ankaŭ Esperantokurso, sed esperantista skoltotrupo el tio ne rezultiĝis.

Kiam en ĉiuj partoj de la iama monarkio fondiĝis skoltotrupoj, Teuber deklaris en aprilo 1914 la starigon de Aŭstria skoltoligo. Bedaŭre la jam tre fortaj ĉeĥaj kaj polaj ligoj pro „naciaj" kaŭzoj ne volis aliĝi. Same la germanaj skoltokorpusoj en Bohemio kaj Stirio rifuzis aliĝon. La ligo do nur ampleksis la Vienan korpuson, la grupojn St. Georg en Wien kaj Graz, germanan korpuson en Brno, fine la grupojn en Bielitz-Biala kaj Klosterneuburg.

Sed nun sekve de la murdigo de la tronheredonta paro eksplodis la mondmilito kaj ĉie en la tiama monarhio la skoltaj trupoj sin disponigis al la lokaj organizoj de „Ruĝa Kruco", ĉie akceptataj kiel bonvenaj helpantoj. Dum la unuaj 10 tagoj post la mobilizo la skoltoj sole faris la malfacilan deĵoron en ambulancoj, hospitaloj ktp., ili asistis ĉe la alveno de la unuaj vunditoj kaj servis en militistaj kancelarioj kiel kurieroj. Kiam en aŭgusto komenciĝis la diversaj helpagadoj por vunditoj, kaptitoj, vidvinoj kaj orfoj post mortintoj, skoltoj fariĝis urĝe necesaj. La Viena korpuso do devis komenci grandstilan varbadon kaj sekve de tio la

Bundesmeister Grafo **Herbert Herberstein.**

aktivaj skoltoj kreskis al 500 kaj 7 novaj ejoj estis je dispono.

Zorgoplenaj, malĝojigaj tagoj venis por nia patrolando. Invado de la rusoj ĝis Wien ŝajnis ebla, la militistaj instancoj do ordonis la fortikigon de la ĉefurbo. Baldaŭ senfinaj trancĉeoj trairis kampojn kaj arbarojn, fortaj betonumitaj baterioj superregis la ĉirkaŭaĵon de Wien.

En majo 1916 „Unuigitaj Vienaj Skoltokorpusoj" fine decidis la starigon de tendaro en Neulengbach. Pli ol 100 skoltoj unuafoje ĝuis la veran skoltan vivon.

La jaro 1917 alportis fortan kreskadon de Ligo. Aliĝis multnombraj kaj bone organizitaj grupoj en German-Bohemujo. Fondiĝis maristaj skoltotrupoj en Lussinpiccolo kaj Triest, kiuj aliĝis. La lasta, subtenata de la registaro, baldaŭ posedis 30 diversajn boatojn.

En somero 1917 la skoltaro denove kunvenis en sia tendaro en Neulengbach, travivinte nekompareble belajn semajnojn. Dum 5 jaroj de celkonscia kaj pacienca laborado skoltgvidanto estis maturiĝinta, modela kaj bonega: Karl Barteis. Ideala juna homo kun firma karaktero li sukcesis enpenetri an la animojn de la knaboj. Kiu povis ĉeesti unu el tiaj dumnoktaj kunvenoj ĉe la tendarfajro kaj aŭskulti la emociajn vortojn de la „kara" Barteis, tiu komprenis, ke la semo, plantita en la junajn korojn, montris belegajn fruktojn. Neniam skoltaj virtoj floris pli bele ol dum tiu tempo.

En printempo 1918 la imperiestro honoris la ligon, donante al ĝi la rajton montri la imperiestran kronon en insigno kaj sigelo. Grandajn meritojn je plifortigo de la Aŭstrio Skoltoligo akiris ĝia „honora skoltestro" Rudolf Slatin Pascha, la heroo de Sudano.

Lastfoje kunvenis skoltaj fratoj el ĉiuj partoj de la monarhio dum julio 1918 en la tendaro Neulengbach. Tiam nia potenca patrujo disfalis.

1919. La landoj asocioj kaj lokaj grupoj en la teritorioj, disigitaj de Aŭstrio, perdiĝis, la fortaj mar-korpusoj ĉe Adria likvidiĝis, la ligo mem devis limigi sian agadon sur la teritorio de la nova Aŭstrio.

Iamaj Vienaj gvidistoj fondis en 1920 novajn ligogrupojn en Salzburg kaj Innsbruck. La nombro de la skoltejoj en Wien kreskis al 15; en somero oni tendaris en 17 lokoj aŭstriaj, la plej belaj en Alpoj. Dum julio okazis en Londono la unua internacia kunveno de skoltoj el la tuta mondo. Aŭstriaj pro manko de mono ne povis partopreni. Tiam Sir Robert Baden-Powell estis elektita „Mondĉefskolto". En aŭtuno la unua „lup-ida" trupo estiĝis.

En 1922 aŭstrianoj la unuan fojon partoprenis internacian konferencon de skoltgvidistoj en Parizo. „Kara" Barteis pro malsano devis rezigni la gvidadon de Viena korpuso. Poste la evoluo haltis. Estinte iam la tegmenta organizaĵo de ĉiuj aŭstriaj skoltoj ĝi malfortiĝis iom per eksiĝo de katolika skoltaro, kiu formis propran korpuson St. Georg kaj nun jam superis la „majstron" laŭ nombro de anoj kaj ejoj, sed ne laŭ skoltaj kvalitoj.

1937 estas jubilea jaro de Aŭstria Skoltoligo. 25 jaroj pasis depost fondo de skolta movado en nia patrujo. Ligo projektas indajn festaranĝojn.

La 27-an de junio benado de Ligostandardo en Michaeler-preĝejo.

La 12-an de julio komencos nia tendarvivo en Klesheim proksime de Salzburg. Granda tendar-urbo, belaj ludoj, ĉarmaj tendarfajroj, bona kamaradeco estas la signoj de nia tendarvivo! Ĝi daŭros ĝis fino de aŭgusto.

Ni kore invitas vin partopreni en niaj aranĝoj!

Gratulleterojn al nia Ligestro Grafo Herberstein (Aŭstria Skoltoligo), Wien, I., Wipplingerstraße 8.



Kuranto Remanto Pilkludanto



Kamparana tolaĵ- kaj vestaĵ-ŝranko el Malsupra Aŭstrio.

Originala artikolo por AE de **inĝ E. H. Jordan**, Bundeskommissariat für Heimatdienst" en Federacia Kancelierejo.

La enhavo de la ŝranko — fidele al jarcenta tradicio plena da produktaĵoj de kampara hejmindustrio — montras dekstre malsupre maldikajn fasketojn de linofadenoj, super ili rulitajn hejmtolaĵojn, maldekstre la vestaĵojn por dimanĉo, supre kaj sur la pordoj familiajojn, pilgrimmemoraĵojn kaj memorsignojn.

Originala artikolo por AE de **inĝ E. H. Jordan**, Bundeskommissariat für Heimatdienst" en Federacia Kancelierejo.

„Pfingstnigl"

estas la ĉeffiguro de pra-malnova, gaja popolkutimo el la regiono de Neunkirchen en Malsupra Aŭstrio. Tiu juna homo, kiu tro longe dormis je Pentekosto-lundo kaj pro tio venas kiel lasta al Pentekosta meso, estas, vestita per pajlo kaj junko, kondukata en procesio tra la loko kaj fine puŝata en la akvon kiel averta ekzemplo por longdormuloj kaj kuŝemuloj.

Mia vojaĝo al la Estrarkunsido de IEL.

Post 23-hora veturado por rapidtrajno en rekta translima vagono mi alvenis en Haag, la bela metropolo de Nederlando, kie min en la stacidomo jam akceptis amikoj Mooij, ĉefdelegito de IEL por Nederlando, kaj Ravestein, del. de IEL por Haag. Konvenan noktigejon ili jam estis preparintaĵ por mi kaj ĝis meznokto ni sidis kune kaj parolis pri la 28-a, Wien kaj Esperanto.

La sekvintan tagon amiko Mooij min gvidis tra bela Haag, montris al mi la vidindaĵojn kaj ni vizitis nian amikon Teo Jung, la eldoniston de Heroldo de Esperanto, en Scheveningen, la bela marbordloko.

Posttagmeze ni estis gastoj ĉe familio Ravestein kaj s-ro Ravestein montris al ni la belan filmon pri Viena Kongreso kaj la kongresvojaĝo tra Aŭstrio. Ni havis vere belan kunvenon. La filmo jam estas montrita en diversaj grupoj de la lando kaj ĉiam kun granda sukceso.

La 27. marto aro da Haag-aj s-anoj veturis komune kun mi al la Nederlanda E.-Kongreso en Den Helder. Dumvoje aliĝis s-anoj en la diversaj stacioj kaj inter ili Julius Glück, kiu estis mia E.-instruisto. Nuntempe li vivas, instruas kaj verkas en Nederlando. Li siatempe eldonis kun nia mortinta s-ano d-ro Sós tiam tre ŝatatan lernolibron. Ni haltis en Alkmaar, rigardis la urbon kun interesaj antikvaj konstruaĵoj (urbdomo, pesilo kun sonorilhorloĝo sur la turo) kaj manĝis en E.-manĝejo. Ni daŭrigis la vojon al den Helder. Posttagmeze malfermo de la Kongreso, kiun ĉeestis pli ol 200 personoj, poste oficiala akcepto ĉe la urbestro, kiu salutis en nederlanda kaj Esperanta lingvoj. Prez. Baas de LEEN respondis. Poste mi salutis nome de IEL kaj Aŭstria E.-Asocio, Josef R. Scherer kiel prez. de Amerika E.-Asocio, f-ino Squire nome de Brita E.-Asocio ktp. Vespere amuza programo.

28. marto laborkunsidoj, promenado kaj vizito de la urbo, kiu estas samtempe milithaveno. Vespere unike bela programo, imitinda!

29. marto ekskurso al insulo Texel, kie estas starigita Esperantonumento impona.

Mi ne povis partopreni, sed veturis al Rotterdam, por rigardi la urbon, en kiu helpis min la del. de IEL instr. Grisnigt.

Posttagmeze mi forlasis la urbon kaj veturis al Bruxelles. Tie regas vere grandurba vivo ĝis tre malfrue en la nokto. La 30. mi rigardis iomete la urbon, kiun mi jam konas okaze de la Antwerpena Kongreso 1928 kaj vizitis la prezidanton de Belga Ligo Esp-ista d-ron Kempeneers, direktoron en granda hospitalo. Li aŭtomobilis min ree en la urbon kaj mi veturis al Ostende kaj de tie trans Dover al London. Ege interesa estas la bildo, kiu prezentiĝas de Dover, se oni venas ŝipe. Bele situas sur krutaj rokoj kastelo, lumturo kaj la domoj. Rapidtrajno senhalte veturigis min en tre lukse ekipita vagono al Victoria Station, kie ĝeneralsekretario de IEL s-ano Goldsmith kun sia filino atendis min kaj aŭtomobilis min al Rickmansworth, kie en la hotelo jam estis prez. de IEL generalo Bastien kaj estrarano instruisto Malmgren el Stockholm. Estrarano prof. d-ro Kamaryt el Bratislava ne povis veni.

Dum 3 tagoj de mateno ĝis vespero ni 4 en vere harmonia maniero streĉe laboris en la bela hejmo de IEL en Heronsgate kaj finis nian taskon. La statutoj estis finredaktitaj, konsiderante la dezirojn de la unuopaj komitatanoj laŭ ebleco, kaj la Ĝenerala Regularo. La propono de Brita E.-Asocio, okazigi en 1938 la Universalan Kongreson en London, estis akceptita.

La 2. aprilo ni vizitis la kunvenon de la Londona E.-Klubo, vizitita de 100 personoj kaj parolis tie kelkajn salutvortojn.

La 3. mi rigardis iomete la urbon kaj estis gvidata parte de s-ino Elizabeth Warren, sekretariino de Londona E.-Federacio (unuiĝo de la Londonaj E.-Societoj) kaj ĉeestis posttagmeze ĝis vespere la kunvenon de la Federacio. Tien venis ankaŭ amiko Blaise, ĉe kiu mi tranoktis en lia hejmo „Bonveno". Mi trarigardis lian bibliotekon kaj elektis proksimume 500 pecojn, kiujn la kara amiko sendos nun kiel donacon al Internacia E.-Muzeo en Wien, Neue Burg. Imitinda agado!

La 4. posttagmeze akompanate de amiko Blaise mi veturis en la urbon kaj de Victoria Station al Folkestone kaj de tie per ŝipo al Boulogne, la urbo de la Ia Universala Kongreso de Esp. Bedaŭre mi ne povis renkonti samvespere amikon advokaton Sergeant, kiu estis for. Sed la venintan tagon mi rigardis la urbon, iris al la delegito de IEL, provis viziti amikon Duchochois, kiu bedaŭre ankaŭ estis for, kaj fine iris al la domo de Sergeant. En lia foresto mi rigardis la ĉambron de mia mortinta amikino Alice Sergeant kaj en akompano de la sekretariino de s-ano Sergeant mi iris al la tombejo, por fari mian viziton al mia amikino Alice. Bela tombomonumento, dedičita al ŝi de la Boulogna E.-Grupo „Verda Stela, Unua Kongreso" kun la E.-insigno kaj E.-inskribo.

Poste venis amiko Sergeant al la stacidomo. Ni kisis unu la alian kaj parolis pri la kara mortintino, kiu mortis antaŭ 3 jaroj kaj kiun li neimageble prifunebras. Kore ni adiaŭis kaj la trajno min transportis trans Calais kaj Lille al Bruxelles.

Post mia alveno mi tuj telefonis al d-ro Kempeneers kaj li kaj lia edzino akompanis min al la kunveno de Esp. Brusela Grupo, kie ni tre amuzis kaj kantis kantojn el „Blanka Ĉevalet".

Dum ĉiuj kunvenoj mi varbis por la vizito de nia nova Esperanto-Hejmo en Gmunden en Aŭstrio.

La 6. mi forveturis al Aachen kaj vizitis tie s-aninon Buchty, kiu akompanis min kaj ĉe kiu mi estis tagmanĝogasto. En societo de ŝia patrino kaj de ŝi mi travivis agrablan tempon.

De Aachen al Köln, kie mi ne trovis s-anon hejme, kaj de Köln al Wien.

Mi devas konstati, ke IEL funkcias kaj ke la delegitoj faris pli ol sian devon!

Steiner, estrarano de IEL.

30a Universala Kongreso de Esperanto 1938 en London

laŭ decido de la Paska Estrarkunsido.

Radio Wien:

23. aprilo: „Printempofesto en Wachau“ ĝi. Hugo Steiner.

14. majo: „Per poŝtaŭtobuso tra la ĉarma montegaro de Aŭstrio“ Rudolf Ulbrich.

28. majo: „Kuraclokoj kaj somerrefreŝejoj en Austrio“, d-ro Lothar Steiner.

Radio Brno, Praha I, Mor. Ostrava:

15. aprilo: 22.20—22.30 h: „Kavaleria Patrolo“, dramo en 3 aktoj.

5. majo: 22.20—23 h: „Koro en Floro“, gaja kabaredo maja.

Radio Mor. Ostrava:

4. kaj 11. majo prelegoj 18—18.10 h.

Radio Ljubljana (569.3 m):

15. aprilo: 22.15—23.15 h: „Lubljana Vespero“. Aŭskultintoj ĉiam skribu karton al la Stacio!

Je la memoro de 100-jara datreveno de l' morto de Puschkin

Verkita por AE de Kazis Vidikaŭskas, Philadelphia, Usono.

Aleksandro Sergejevičo Puŝkino, nask. 1799, mortinta la 29. jan. 1837.

Jam disiĝis, flugis for
Jen en la spaco,
Kvazaŭ ia meteor',
Sen ia minaco

Mult' da jaroj, tuta cent'!
Kredu ĉiu homo!...
De tiu ĉi la moment',
Kiam en la domo

Agoniis la diet',
(Antaŭe vundita)
En Puŝkina korp'-poet'
De l' laŭroj kronita.

De Rusujo, granda land',
En Malnova Mondo...
Puŝkin' estas kiel Dant',
De l' poezi' fonto...

Kvankam mortis... sed ĝis nun,
Do ĝis lasta tago
Li ekzistas, kiel sun',
Malgraŭ sarkofago...

Sur la tero, eĉ sur mar'...
De nia planedo
Dank' al sia la verkar',
Je tiu ĉi kredu!...

Ĉie, ĉiu konas lin,
Kvankam li sen spiro...
Kaj lin konos, ĉar Puŝkin',
Kun la ora liro,

Jam atingis, kiel Tass',
Aŭ kiel Homero,
Senmortecon de l' Parnas',
Do de l' ĝia sfero.

Kie vivas lia muz'
Kaj ankaŭ Apolo;
Kvankam Puŝkin' estas rus'
(Sed kun aŭreolo),

Lin adoras ĉiu hom'
(Kun granda fervoro)
De la mondo lia nom'
Kaj lia famgloro.

Sonas laŭte, diras mi,
En ĉiea loko,
Ĉar li estas duondi'
De nia epoko!

Kvankam kuŝas li sen spir'
Tie... en Rusujo,
Lin adoras ĉiu vir'
De Esperantujo.

Kaj adoras ankaŭ lin
Eĉ la malamiko,
Kvankam kuŝas bard' Puŝkin'
En ter' sen la psiko.

Innsbruck, ĉefurbo de Tirol.

(Originala art. de Landesfremdenamt Innsbruck)

Innsbruck (574 m) estas fama pro sia ĉarma pejzaĝa situo ĉe la malsupro de 2300 m alta, deklivege supreniĝanta Nord-ĉeno. La urbo kun ĉiuj modernaj publikaj instalaĵoj estas riĉa je vidindaĵoj. La belega ĉirkaŭaĵo prezentas variegan diversecon je promenadoj kaj ekskursoj laŭ la gusto de la vizitantoj.

Venu al Innsbruck!

Internacia Esperanto-Ligo.

Kiel promesite aperis la Jubileo-Jarlibro fine de marto. En sia ora kovrilo ĝi aspektas tre alloge kaj certe ankaŭ allogos multajn novajn membrojn.

Sur 258 paĝoj estas prezentita al la membroj vere interesa enhavo: Antaŭparolo de la prezidanto, Estraro, Honora Membraro, Dumviva Membraro, E.-Lingva Komitato kaj Akademio, Mortintoj, E.-Landaj Asocioj (aliĝis pli ol iam estis ĉe UEA, en la lastaj tagoj Helena E.-Asocio), Esperanta Gazetaro, E. en la Lernejo, E. en la Moderna Vivo, La Universalaj Kongresoj, 28a Kongreso en Vieno (16-paĝa raporto de A. Baur), Laborkunsidoj dum 28a, Propagando de E. (Malmgren, 12-paĝa), Libroservo de IEL, Internacia E.-Muzeo, Landaj Raportoj (sur 29 paĝoj ege interesa materialo pri la progresoj en la unuopaj landoj), E. kaj Radio kun statistiko (Henriksson), Varsovio la estonta kongresurbo, Rolo de la Delegitoj, kaj sur 100 paĝoj la delegitoj (jam pagintaj siajn kotizojn).

Ĉar ĉiutage aliĝas novaj Patronoj, Delegitoj kaj membroj, estas intencate eldoni en aŭtuno kompletigan Jarlibron.

Ni gratulas al IEL kaj ĝeneralsekretario Goldsmith pro la rapida kaj bona laboro!

IEL.-sigelmarkoj!

Belaspektaj, sur ora grundo „Unueco estas forto, aliĝu al Internacia Esperanto-Ligo“.

INFORMOJ EL AŬSTRIO

Duko de Windsor, nia kara gasto, kiu nun jam de monatoj restados en Aŭstrio, nun loĝas en vilao ĉe fama Wolfgang-lago kaj de tie faras ekskursojn, en la lasta tempo tiajn sur Schafberg-pinton (1780 m).

Kongresurbo Wien. Malgraŭ la grandaj aranĝoj, kiuj ĉijare altiras multajn gastojn, nome la kronadaranĝoj en Londono kaj la Mondekspozicio en Paris, tamen ni en Wien ne bezonas timi, ke pro tio la fremdultrafiko suferos. Jam la aranĝo de 13 internaciaj kongresoj kun pli ol 100.000 vizitontoj estas certigita! Aliaj sekvos! Do venu ankaŭ vi al Wien!

Kongreso de „Neues Leben“, kultura fako de l'Aŭstria „Patriota Fronto“.

En la festsalonego de Malnova Viena Urbodomo kunvenis la gvidantoj de la kulturorganizaĵo de Patriota Fronto „Neues Leben“ (Nova Vivo“). Generala sekretario Zernatto difinis la grandan kunvenon kiel feston de l'finkonstruo. La komencaj malfaciloj estas venkitaj kaj oni povas kun fido rigardi en la estontecon. Gvidanto de l'landa organizo, urbestro **Schmitz** esprimis siajn gratulojn al la granda verko por la kultura laboro. Federacia kanceliero d-ro **Schuschnigg** difinis per sekvantaj vortoj la taskojn de „Neues Leben“: Konservi la praaĝan kaj senfine valoran aŭstrian kulturon, teni ĝin en rilatoj al la moderna tempo kaj kunligi ĝin nedisigeble kun la postuloj de l'moderna vivo; fine, veki kaj subteni la komprenon por la hejmlanda kulturo en ĉiuj rondoj de l'popolo. Oni ne devas sin limigi en sia politika kaj spirita agado nur je tio, ke oni rezistas kontraŭ la eraroj de nia tempo, sed oni devas al la sterila babilajo kontraŭmeti la **rezultaton de sia propra laboro.**

La stato de l'aŭstria valuto.

Prezidanto de Nacia Banko d-ro Kienböck publikigis jus en grava angla financa revuo artikolon pri la financa situacio de Aŭstrio. Li konstatas en ĝi, ke la aŭstria valuto en la jaro 1936 dank' al eniro de eksterlandaj devizoj evoluis favore. La kovro de l'banknotoj leviĝis de 26.1 procentoj fine 1935 al 37.43 procentoj fine 1936. **La ŝuldoj de Aŭstrio al la eksterlando** malkreskis je ĉirkaŭ 20 procentoj. **La registaro konservos absolute la nuntempan valoron de la ŝilingo.** Deva'origo de l'aŭstria mono ne estas konsiderinda jam pro la neceso, ke oni devas importi krudmaterialojn kaj nutraĵojn el la eksterlando.

Heroldo de Esperanto en sia numero 11 detale raportis pri la E.-movado en Aŭstrio.



„Radborado“ aŭ „Veturado sur muelejrado“.

Originala artikolo por AE de inĝ E. H. Jordan, Bundeskommissariat für Heimatdienst“ en Federacia Kancelierejo.

Tre ŝatata dancludo, kiu servas ankaŭ kiel fortoludo, en Malsupra Aŭstrio dum la tempo de linrikolto. Dancata de 6, 8, 10 aŭ pli da junaj viroj ĝi konsistas ĉefe el tio, ke la kvar viroj estas turnataj de la aliaj kaj ke nur la kalkanumoj de la piedoj tuŝas la plankon.

Speciala poŝtstampilo por Esperanto-Domo en Arnhem. Generalpoŝtdirekcio de Nederlando konsentis stampi ĉiujn poŝtaĵojn, kiuj eliras Esperanto-Domon en Arnhem per aparta atampilo „Esperanto-Domo, Arnhem“.

Koran gartulon al Cseh-Instituto!

Por aŭtomobilistoj . . .

Propono de s-ano Weißkirchner, Ebensee, Aŭstrio.

Ni aŭtomobilistoj havas internaciajn signojn, sed vere interkompreniĝi nur malmultaj kapablas en alilando. Mankas la interkompreniga lingvo Esperanto, kiu multege helpos al la Aŭtomobil-kluboj. Multaj timas veturi eksterlanden pro nescio de la koncerna lingvo.

Tial ĉiuj aŭtomobil-kluboj en la mondo donu alvokon al siaj membroj tuj:

1. ĉiu aŭtomobilisto scipovu Esperanton;
2. ĉiu mekanikisto scipovu Esperanton;
3. ĉe ĉiu benzinvendejo esperantisto!

Al tio necesos granda propagando en la fakĵurnaloj, interrilatiĝo kun la Esp.-asocioj kaj lernado de Esperanto.

„Automobilklub der Schweiz“ respondis al la proponinto, ke oni sin turnu al „Conseil Central du Tourisme International“, Paris 8, Ave des Champs Elysées 127, en kiu ĉiuj gravaj aŭtomobilkluboj estas organizataj.

Ni petas niajn amikojn en tutmondo, skribi al ĉi tiu adreso, proponante, kion vi legis, speciale niajn amikojn en Francujo ni petas pri senpera interrilatiĝo, ĉar almenaŭ ĝi necesas en la kadro de Intern. Konferenco.

Danubo-valso kun tigro-blekego.

Kuala Lumpur estas radio-stacio en Malajo-Ŝtatoj. Proksimume 50.000 blankuloj kaj indiĝenoj aŭskultas la vere ne varian programon. Sed la stacio disponas pri sufiĉaj rimedoj, ĉar la indiĝenaj princoj zorgas kaj ankaŭ pagas pri parto de la programo. Ekzemple vi aŭdas: „Princo Amatara rigardis hieraŭ kun granda intereso sian ĝardenon kaj mem surverŝis siajn florojn“, aŭ „Lia princa moŝto de Siamur hieraŭ suferis iomete je kapdoloroj, sed lia stato ĝojige pliboniĝis dum la nokto“.

La programo kutime konsistas el angla militista orkestro, fonografaj diskoj kaj indiĝenaj muzikistoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj okazis jena ekscita alero en la „Studio“ de la sendstacio. Jus angla orkestro dekdu-vira ludis eŭropan dancmuzikon, poste klasikajn simfoniojn kaj je la fino la eternan Danubo-valson. Subite la muzikistoj aŭdis bruegan krakadon kaj sekundon poste aperis en „Studio“ grandega tigro, kiu estis sin liberiginta el lignokaĝo. La orkestrestro faligis sian taktilon kaj prenis pistolon el sia poŝo. La muzikistoj, kiuj sidis kun siaj dorsoj kontraŭ la tigro, nenion estis vidintaj. Nur nun ili vidis la grandan danĝeron, en kiu ili troviĝis.

En ĉi tiu momento ili montris veran heroecon. Ili ne ĉesis ludi. La estro donis la takton per la revolvertubo, sed seninterrompe rigardis la tigron. Dum 3 minutoj la tigro aŭskultis la belajn sonojn de Danubo-valso. Poste li subite turnis sin kaj rapide forlasis „Studio-n“.

Kun admirinda trankvileco la muzikistoj finis la valson. Poste la anoncisto iris al la mikrofono. Li estis mortpala kaj lia voĉo iomete vibris. Unue en angla lingvo poste en la malaja li diris: Gesinjoroj! La orkestro Smith finis per la prezentado de Danubo-valso de Strauss sian vesperkoncerton. Se vi dum la lasta muzikaĵo aŭdis mallaŭtan tigroblekadon, tio devenis el tio, ke tigro vizitis „Studio-n“ kaj dum 3 minutoj aŭskultis la valson de Strauss. (Laŭ Telegraf)

NOVAJ PUBLIKIGAĴOJ

Maria kaj la Grupo. Originala romano de Emba. Eldonis Literatura Mondo. Budapest, La lasta volumo de C-serio de AELA 1935. Formato 20 × 13'5 cm. 176 paĝa, kun kolora kovrilo. Prezo broŝurita 0.70 dolaroj, bindita 0.95 dolaroj, sur luksa papero, en luksa bindo 1.30 dolaroj, plus 10% por sendo.

Poemoj de Artur Domenech (Barcelona 1937) Pruvo, kiel oni povas skribi fluantajn ne nur delikatajn sed ankaŭ gigantajn ritmojn sen eĉ unu neologismo, kiuj per bildoriĉo senpere de pensoj kaptas la koron, estas tiu ĉi maldika 36 paĝa libreto de Artur Domenech, la bopatro de en esperantaj rondoj konata Grau Casas. Ĉiuj animstatoj en diversaj gradoj estas ene. Malĝoje delikata estas la poemo „Al neamanta amatino“. Ega fajra pentraĵo de la kreanta kaj vivanta amo estas: La naskiĝo de Amo. Sed ankaŭ la humoro trovas vortojn. Post longa pripenso, kio okazus, se li estas roso, papilio k. t. p., li finas: „mi ne estas roso, guto... sed nur poeto“. Dr. Maier.

„Verema Raporto pri la German-Molsa Milito“, de P. Th. Justesen. 24 pĝ, 13. 5 je 19 cm. Prezo 2 int resp. kup. Eld.: P. Th. Justesen en Famerup pr. Kolind, Danujo.

La aŭtoro rerakontas en libera maniero malnovajn historietojn pri militaj okazintaĵoj. La lingvo estas simpla kaj facile komprenebla, la temo de la rakontoj instigas iafoje al rido, iafoje parolas al la koro. D-ro Pfeffer.

Geinstruistoj! Havigu al vi la libron pri Instruista Kunveno dum 28-a en Wien. La 64-paĝa libro kun 18 paroladoj de s-anoj el 11 landoj multe helpos vin en viaj klopodoj pri enkonduko de Esperanto en la lernejon! Kun afranko 5 poŝtresp. kup. Int. E.-Muzeo, Wien, I., Neue Burg peras la alsendadon.

Kongres-karikaturoj.

Fama karikaturdesegnisto Kora en Wien faris karikaturojn sur poŝtkartoj de prez. Bastien, prof. Bujwid, dir. Goldsmith, estrarano Malmgren kaj prez. Steiner; krome belan portreton de Zamenhof. Haveblaj 2 por 1 poŝtresp. kup., ĉiuj kune por 2 resp. kup. Int. E.-Muzeo, Wien, I., Neue Burg.

Anoncoj.

Anoncoj havas plej bonan efikon, ĉar la gazeto eliras al 122 Landoj; 2-linia ŝ 2.—, ĉiu plua linio ŝ 1.—.

Cinujo. Charles S. Chen, 11 Yung Hsing fifth St., Swatow, deziras korespondi pri komerca movado, arto, muziko kun Aŭstrio, Britujo, Usono, Kanado.

F-ino Ibuŝi-Sadako, ĉe „Vera Vojo“, deziras koresp.: Tokio, Kanda, Cukasa maĉi 2—3, Japanujo.

XIX. Intern. Kongreso de **katolikaj esperantistoj** (IKUE.) okazos en Haag, Nederlando, 1.—6. de aŭg. Kotizo hol. guld. 2.50. Anoncoj al ĝenerala kongresekretario Fr. Marrevee, Schuytstraat 19, Den Haag.

„Aŭstria Antologio de la 20-a jarcento.“ La unua volumo baldaŭ eliros. Prezo kun afranko 4 rpk. Antaŭmendintoj kaj paginto de ĉiuj 6 volumoj ricevos belan kovrilon por la tuta verko! **Mendu tuj!**

„Tra Aŭstrio per aŭtobuso“, vojaĝlibro, 80-paĝa, tra la plej belaj partoj de Aŭstrio kun 70 bildoj, nur 3 resp. kup.

„Somera Universitato,
Internacia Konferenco de Instruistoj,
Internacia Konferenco de Virinoj,
dum la 28-a Univ. Kongreso en Wien 1936“
ĵus aperis en 64 paĝoj, 23.5×15.5 cm, kun 18 paroladoj kaj 4 rezolucioj de s-anoj el 11 landoj. Prezo kun afranko aŭ ŝ 3.— aŭ 5 int. poŝt-resp. kup. Nur malgranda stoko! Tre grava por varbado al Pentekosta Konferenco en Paris!

„Albumo de Wien“, bele bindita kun pli ol 100 bildoj kun klariga E.-teksto, nur 5 resp. kup.

Heroldo de Esperanto

ankaŭ nun aperas nepre regule, eĉ en plibonigita formo, — ĉar ni fidas, ke jam baldaŭ **revenos pli bonaj tempoj.** Petu senpagan specimenon de la eldonejo

Heroldo de Esperanto

Scheveningen (Nederl.), Harstenhoeckweg 223.

Esperantistoj!

Vi ofte esprimis la deziron havi sendependan organon, liberan por ĉiuj

Tia organo estas

la plej malkara el ĉiuj esperantaj gazetoj:

Nia Gazeto

monata, grandformata, ok-paĝa, ilustrita, internacia revuo.

Direktoro: **Georges Avril.**

Prezo de abono: 3 svisaj frankoj por 12 numeroj, nur antaŭpage.

Redakcio kaj Administracio:

ĉe **„L'Eclaireur“,** 29, avenue de la Victoire, **Nice,** Francujo.

Literatura Mondo, Budapest, IX., Saroksári ut 38—40 V 6.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 28.

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist"

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des Oesterreichischen Esperanto-Bundes

Nr. 4 (19) April 1937

Für Oesterreich jährlich mit Postzusendung, nur zu fünf Stück, S 2.50 in Briefmarken. — Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Internationale Konferenz.

„Esperanto im modernen Leben."

Paris, 14.—17. Mai 1937.

Protektor: Staatspräsident Albert Lebrun.

Ehrenausschuß: Ministerpräsident Blum und alle Minister, außerdem hervorragende Persönlichkeiten des öffentlichen Lebens.

Zweck der Konferenz, an der die Ministerien für Unterricht, Verkehr, Eisenbahn usw., außerdem große Körperschaften der verschiedenen Berufe, sei es auf wissenschaftlichem, technischem, kommerziellem oder anderem Gebiete der verschiedensten Länder teilnehmen werden, ist:

Einführung des Esperanto in alle Gebiete des modernen Lebens.

Auskünfte gegen Rückporto. Int. Esperanto-Museum, Wien, I., Neue Burg.

---

29. Esperanto-Weltkongreß.

Warschau, 7.—15. August 1937.

Protektor: Staatspräsident Prof. Dr. Ignacy Moscicki.

Ehrenausschuß: Alle Minister, Oberbürgermeister von Warschau und andere Persönlichkeiten.

Dieser Kongreß gilt als Jubiläums-Kongreß, da 50 Jahre vergangen sind, seitdem das erste Lehrbuch des Esperanto — zu sehen im Internationalen Esperanto-Museum in Wien, I., Neue Burg — erschienen ist (1897).

In Warschau, wo Meister Zamenhof, der Entdecker des Esperanto, viele Jahre als Armen-Augenarzt gewirkt hat und gestorben ist, haben die Esperantisten der ganzen Welt dem toten Meister ein Grabmal errichtet; hier in Warschau soll der Jubiläumskongreß tagen.

Es wird für die österreichischen Kongreßteilnehmer eine gemeinsame ermäßigte Fahrt zum Kongreß veranstaltet werden. Anmeldungen (gegen Rückporto auch Anfragen) an Int. Esperanto-Museum, Wien, I., Neue Burg.

Einige Gedanken über das Englische als Weltsprache.

Dr. Lehmann Wendell, USA.

(Aus „Esperanto Internacia" übersetzt.)

In den Vereinigten Staaten hört man oft die Behauptung, daß man mit der englischen Sprache in der ganzen Welt durchkomme und daß daher die englische Sprache Weltsprache werden würde.

Ich will hier nur einige Erfahrungen anführen: Meine Schwester hat schon drei Weltreisen gemacht, aber sie ist selten Menschen begegnet, die die englische Sprache leicht und verständlich gesprochen haben. In Deutschland kam sie frühmorgens in einer Stadt an und suchte, da sie hungrig war, ein Restaurant. Sie fand es nicht, dafür aber in einer Geschäftsauslage eine Ankündigung „Hier wird englisch gesprochen". Sie ging hinein. Ein reizendes Fräulein trat ihr entgegen. Meine Schwester fragte: „Do you speak english?" Sprechen Sie englisch? „Ja", erwiderte das Fräulein. Große Freude bei meiner Schwester. „Können Sie mir ein Restaurant zeigen?" Das Fräulein sah sie mit großen Augen an. Meine Schwester wiederholte den Satz langsamer, die Augen des Fräuleins wurden noch größer. Meine Schwester versuchte es nun mit der Zeichensprache. Sie öffnete den Mund, zeigte mit dem Finger auf ihn und sagte in Englisch: „Hungrig, Essen". Das Fräulein lächelte, ging rasch in das Nebenzimmer und brachte meiner Schwester eine Zahnbürste.

Wohin meine Schwester ging, überall dasselbe. Man verstand nicht oder nur schlecht.

Fräulein Anena Christianson, Delegierte des Esperanto-Weltbundes in Ambur, Indien, der ich Esperanto durch Korrespondenz lehrte, machte dieselbe Erfahrung, als sie Japan besuchte. Die Japaner verstanden nicht Englisch, aber sie verständigten sich sehr leicht in Esperanto. Und sie hörte und benützte Esperanto zum erstenmale. Zweifellos eine großartige Sache!

Unlängst hörte ich einen berühmten Japaner, der in USA einen Vortrag über die Genossenschaftsbewegung in Japan hielt. Obwohl er Englisch in USA gelernt hatte und Bücher in dieser Sprache geschrieben hatte, so sprach er die Sprache so schlecht, daß sein Vortrag nur ein unverständliches Mischmasch von Wörtern wurde.

Vor einigen Jahren machte ich die Bekanntschaft eines Japaners, der fließend ein schönes Esperanto sprach, während er das Englische nicht elegant sprach.

Vor einigen Jahren kam nach USA ein berühmter Europäer, der an unserer Universität Vorlesungen hielt. Viele Jahre hatte er in USA studiert und kam nun zurück, um an verschiedenen Universitäten Vorlesungen zu halten. Sehr schwer verstand man ihn; er sprach irgendeine Sprache, es war aber nicht Englisch.

Ein junger Norweger wirbt nun in USA für die Oxford-Bewegung. Er spricht Englisch, aber man muß sehr aufpassen, denn seine Aussprache ist eigenartig und oft unverständlich.

Nun, sprechen die Amerikaner das Englische korrekt? Die Londoner sagen das nicht, während wir ob ihres für uns eigenartigen Akzentes lächeln. Einer meiner Freunde besuchte vor einigen Jahren London und wollte „Grape"-Früchte kaufen. Niemand verstand diese Bezeichnung. Als er in einem Geschäfte seine geliebte Frucht sah, fragte er, wie diese heiße und man sagte ihm „pamela".

Wenn ein Diktator die Macht hätte, die englische Sprache universell zu machen, dann müßte er zuerst die „amerikanische" und die „englische" Sprache in Einklang bringen lassen.

Esperanto hat dieses Problem der universellen Sprache schon gelöst und daher muß für diese Sprache unermüdlich und ständig geworben werden.

Krems a. d. D. la urbo de nia Landa E.-Kongreso.

30. de aprilo ĝis 2. de majo.

Krems estas historie vere interesa urbo. Multaj antikvaj konstruaĵoj atestas tion. Prahistoriaj trovitaĵoj en la muzeo montras, ke ĉi tie jam en ia pli frua ŝtonepoko vivis homoj. Keltoj kaj romanoj estis tie antaŭ la ĝermanaj Rugioj, kiuj en la 5. jc. fondis kolonion kaj en 995 la urbo Krems estas unuafoje akte menciita. Multajn militmizerojn la loĝantaro travivis dum la jarcentoj.

Krems situas ĉe la fino de la fama Danubovalo Wachau (elp. Vaĥaŭ) kaj estas nun centro de Wachauer-Printempo-festarangoj.

Kelkaj informoj: Urba paroĥa preĝejo (1616—1630), ekstere tre simpla, sed interne post la katedralo en Salzburg la plej grava monumento de frubaroko en Aŭstrio. Plafonfreskoj kaj kelkaj flankaltaroj de fama J. M. Schmidt (nomita „Kremser Schmidt", 1787). Paroĥejo el 14. jc. Arkadaro kun murpentraĵoj el 13. jc. kaj Ursula-kapelo (15. jc.). Piaristen-preĝejo, kie nia kara P. Mestan legos la sanktan meson, el 11. jc., malfrugotika, trinava pilastro-baziliko, la turo kun baroka kasko kaj 480 kg peza sonorilo, ĉefaltaro kaj kelkaj flankaj de Kremser Schmidt, seĝaro el 1600. La domoj 4, 8, 13, 14 sur Körnermarkt estas kun atentinda fasado. Mario-kolono el 1685. Dominikaner-preĝejo, 13. jc., nun en ĝi kinoteatro kaj muzeo de la urbo. Steiner-Urbportego, la subkonstruaĵo el 1480, kun rondturoj kaj sur la dekstra la komencliteroj de la devizo de emperiestro Friedrich III., kiu finkonstruis en 1470 Bürgerspital-preĝejon, „A. E. I. O. V." (Aŭstrio plena de ĉiuj honoroj). Proksime la nova juĝej-konstruaĵo, kazerno kaj Urbparko. Obere Landstrasse: Domo 32 Alte Post kaj Wengrafhof (1500) kun neregulaj pitoreskaj kortoj kun arkardaroj; 12 en la frontono modernaj freskoj, montrantaj la inventon de la presarto. 10 Fellnerhof, renesanca korto kun kolonoj kaj balustrado. Bürgerspital-preĝejo kun „A. E. I. O. V." sub la enirejo, malfrugotika frapilo kaj tabernaklo el 1470. Nr. 4 Urbdomo (15. jc.) ĉe la angulo bela renesanca fenestra balkono.

Dachsberggasse 1 Kleeweinhof: arkadaro renesancstila, 16. jc. Täglicher Markt 2 Gögl-Erker, belega malfrugotiko, riĉa ornamaĵo. Tri-unuokolono 1738. Ĉie tie staris la iama burgo de la landprinco.

Pulverturmgasse: Pulvoturo, rondturo „Lug ins Land" (rigardu en la landon) kun konusa tegmento kaj paf-fendoj, 1477. Iama pafista domo, nun gastejo, kun bela rigardo

al la valo de Krems-rivero. Antaŭ la enirejo dekstre sur la antikva urbmuro „Mandl ohne Kopf“ (vireto sen kapo), ekkonilo el la militoj kontraŭ la svedoj.

Hoher Markt: Puto 1682, mezpunkto de la plej antikva kolonio (1137); nr. 3 Christophorus-fresko 1468, 10 kaj 11 kaj Margarethenstrasse 12 kaj 14 formas domgrupon, kiu estiĝis el alikonstruado de la iama burgo.

Margarethenstrasse 14: Ligna koridoro sur rondarkoj, 16. jc., tra pordo en la blazonkorton. 5 belaj sgrafitto-pentraĵoj el 1560. Burggasse 3: romana kolono.

Untere Landstraße kun Obere Landstrasse la ĉefstrato (1146): Antikvaj burĝdomoj: 52 Gattermann-domo (16. jc.), 63, 67, 69 (Badstuber, Sgraffito de „perdita filo“), 18. jc. 53, 55, 41 (Domo al la 4 sezonoj).

Unser Landeskongreß wurde in das Programm des Wachauer Frühlingsfestes 1937 aufgenommen. Wir schulden hiefür Herrn Minister a. D. Dr. Emmerich Czermak, Landessachwalter für Niederösterreich des „Neues Leben“, besten Dank.

P r o t e k t o r:

Landeshauptmann Minister a. D. **Josef Reither.**

E h r e n a u s s c h u ß:

Bundesminister a. D. **Dr. Emmerich Czermak.**
Bezirkshauptmann Hofrat **Dr. Joh. Schauer;**
Bürgermeister Studienrat **Johann Ramböck;**
Propst **Johann Schrimpf,** Stadtpfarrer;
Kreisgerichtspräsident **Dr. Otto Nahrhaft;**
Hofrat Direktor **Adolf Illing;**
Bezirksschulinspektor Schulrat **Karl Rabl;**
Ortskommandant und Kommandant des Brückenbataillons Vizeadmiral Tegetthoff **Oberst Ing. Hugo Fischl;**
Kommandant des Infanterieregiments Nr. 6 **Oberstleutnant Johann Scheid;**
Abteilungskommandant des n.-ö. Leichten Artillerieregiments Nr. 3 **Oberstleutnant Hubert Stenzl.**

Kongreßbeitrag: Bis 22. April S 2.—, für Familienmitglieder und Arbeitslose S 1.—. Nach dieser Zeit erhöht sich derselbe auf S 3.—, bzw. S 1.50.

Anschrift: Regierungsrat Prof. Kern, Krems a. d. D., Schillerstraße 20.

Zimmer: S 3.50 bis S 5.— einschl. Trinkgeld. Bei sofortiger Anmeldung auch billigere Zimmer. Gemeinschaftszimmer S 1.50. Stets Geld mitsenden.

Anfragen stets Rückporto beilegen.

Geldsendungen: Grauer Posterlagschein auf Konto A 187.625 Gottfried Kern, Krems.

50% Fahrtermäßigung auf den Bundesbahnen von allen Stationen Oesterreichs mit S 1.— Zuschlag für Festabzeichen, das bei der Ankunft in Krems am Bahnhofe ausgefolgt wird. Am Abfahrtsbahnhofe **„Fahrkarte Hin und Zurück für Wachauer Frühlingsfest“** verlangen.

Programm unseres Kongresses:

30. A p r i l:

20 Uhr: Begrüßungsabend des Esperanto-Kongresses im Gasthaus Ehrenreich, Krems, Wienerstraße 29.

1. M a i:

9.30 Uhr: Gottesdienst in der Piaristenkirche in Krems mit Esperantoansprache.

11 Uhr: Festversammlung mit folgendem Programm:
Bundeshymne;
Begrüßung der Ehrengäste;
Ansprachen;
Vortrag Hofrat Steiner über die Esperanto-Bewegung (in deutscher Sprache);
Esperanto-Hymne.

12 Uhr: Mittagessen.

14 Uhr: Hauptversammlung der AEA.
Programm:
1. Verlesung des Protokolles der letzten Generalversammlung.
2. Tätigkeitsberichte:
   a) desVorsitzenden;
   b) des Säckelwartes.
3. Bericht der Rechnungsprüfer.
4. Neuwahl des Vorstandes.
   V o r s c h l a g: Vorsitzender Reg.-Rat Fritz Stengel.
   Stellvertreter: Rechnungsrat R. M. Frey; Otto Müller, Klagenfurt.
   Sekretäre: Univ.-Hörer Max R. Frey; Lehrer Hermann Schnell.
   Kassier: Lehrerin Maria Fiedler.
   Presse und Propaganda: Dr. Emil Pfeffer; Rudolf Ulbrich.
   Beiräte: Prof. Dr. Christanell-Salzburg; Reg.-Rat Robert Kern-Krems; Inspektor Josef Kugler-Linz; Robert Kühbacher-Innsbruck; Ernst Werner-Wien.
5. Arbeitsprogramm für das kommende Arbeitsjahr.
6. Hauptdelegierter G. Weber der IEL berichtet.
7. Allfälliges: Arbeits- und Propagandaprogramm für die nächsten 6 Monate (R. Ulbrich). Werbeprogramm (Hofrat Steiner). Weitere Vorschläge.

Anschließend Führungen durch die Stadt.

19 Uhr: Abendessen.

20 Uhr: Festabend mit reichhaltigem Programm (Salonorchester, Gesangs-

vorträge, Lautenspiel, Deklamationen, Volkstänze, Einakter, Tanz).
Alle Veranstaltungen im Hotel „Goldener Hirsch", Krems, Dreifaltigkeitsplatz 1.

2. Mai:

Gottesdienstbesuch nach Wahl (Pfarrkirche 6, 7, 8, 9, 10.30 Uhr, Piaristenkirche 6.30, 8 Uhr).

10 Uhr: Besichtigungen, Führungen durch die Stadt.
12 Uhr: Mittagessen.
13.30 Uhr: Abmarsch nach Dürnstein, event. Fahrt dorthin.
15 Uhr: Treffen in Dürnstein, Jause, Besichtigungen (Stadt, Stiftshof, Kirche, Ruine).
Abends: Rückfahrt, Heimfahrt.

(Bei Schlechtwetter entfällt Dürnstein und bleiben die Teilnehmer in geeigneten Lokalitäten in Krems.)

Programm des Frühlingsfestes, das vom 30. April bis 31. Mai dauert:

Veranstaltungen in Krems:

30. April:

19.20 Uhr: Marienkantate von Rudolf Wimmer (1. Maiandacht in der Stadtpfarrkirche. Rundfunkübertragung).
20.30 Uhr: Zapfenstreich (Inf.-Rgt. 6).
Beteiligung des Oest. Jungvolkes beim Wettlauf und beim „Maibaumkraxeln".

1. Mai:

8 Uhr: Verfassungsfeier, Jugendkundgebung, Frühjahrsparade der Garnison.
13.30 Uhr: Fußballstädtekampf: Jugend von Krems gegen St. Pölten, Freundschaftsspiele des Kremser Sp. C. und des Vf. B.
17 Uhr: Kremser Historienspiel.
20 Uhr: Konzert.
Oesterreichisches Jungvolk.

2. Mai:

10.30 Uhr: Matinee des Wiener Staatsopernchores.
17 Uhr: Wiederholung des Festspieles.
Dürnstein: Nachmittag eventuell Serenadenkonzert Bruckner.

Sagen Sie es Ihren Freunden!

Unsere Zeitung kostet mit „2te Sprache für Alle" probeweise von April **bis Ende 1937 nur S 3.—.**

Werben Sie jeder, Sie erhalten Bücherprämien nach der Anzahl der Geworbenen!

„Mit dem Ueberraschungszug ins Grüne Land." Kursschlußfest veranstaltet von „Verda Revuo" am 17. April um 19 h 30, Wien, IV., Treitlgasse 3. Preise: 60 Groschen bis 1.20 S.

Diservo. 18. de aprilo je la 10 h en la kapelo de Kath. Gesellenverein, Wien, VI., Gumpendorferstraße 39.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803).

Graz. Al poŝtkurso laŭ publikigo en la oficiala Bulteno de ĝeneraldirekcio de Poŝtoj sin anoncis 11 poŝtoficistoj. La kurson gvidas kolonelo Hackl.

Hainfeld. E-Soc. „Al alta celo" nun ree komencis sian laboron kaj nombras 25 membrojn. Prez. instr. Fr. Wandl komencis meze de marto novan kurson. La grupo aliĝis al AEA.

Innsbruck. Nova kurso kun 25 lernantoj en realgimnazio. Gvid. d-ro A. Karner.

Linz. Supra Aŭstria E.-Societo neŭtrala aranĝis la 9. januaro Zamenhof-feston kaj la 13. de marto amuzan vesperon, el kiuj la lasta speciale estis sukcesplena. Partoprenis gastoj el Wels, Vöcklabruck, Gmunden, Steyr, Ebensee kaj de „Espero" — Linz, entute pli ol 100 personoj. Tre riĉa programo. speciale plaĉis la prezentado de nia plej juna esp-istino la 8-jara Minĉi, filineto de ges-anoj Kugler. Nia vigla junularo tre fervore kunaktoris. Ankaŭ niaj gastoj kontribuis al amuzo.

Melk. Elektoj: prez. Ehrenreich, vicprez. d-ro Vogel, sekr. f-ino Wünsche, s-ro Draschkowitz; kas. Moser; prop. ge-Früböck; kalk. kontr. koop. Bauer.

Wien. Kat. Unuiĝo E., I. Ebendorferstrasse 6 ricevis nun la konsenton de siaj novaj statutoj de ĉefepiskopa kanceliarejo kaj de Viena magistrato. La 14. marto KUE aranĝis „ekleziajn ekzercadojn", kiujn gvidis pastra moŝto Hebenstreit, OFM, en la kapelo de Kath. Gesellenverein, VI. Gumpendorferstrasse 39.

Wien. Esperanto-Klubo invitas al vizito en sia klubejo Wien, I., Wallnerstr. 6 (en la vestiblo la unua pordo dekstre, eventuale sonorigu!) Kunveno ĉi am marde de 18.30 h bis 21.30 h.

Wien. E.-soc. Danubio. 19. 4. St. Fellinger „Albanio en vortoj kaj bildoj"; 26. 4. Parolata E.-gazeto.

Wien. E.-Soc. Fideleco. Nova hejmo XVIII. Kutschkerg. 1 (Café Michelbeuern).

Wien. Poŝt-Esperantogrupe, gvidanto insp. Eduard Sykora, kunvenas ĉiun merkredon 19 h — 21.30 h. Wien, I., Dominikanerbastei 15, Hochparterre dekstre.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.